# KIEL LA HUNGARA POLITIKO PROKRASTIS LA PRILABORADON DE LA HISTORIO DE SIAJ SEKRETAJ SERVOJ KAJ MANIPULIS ILIAJN DATUMOJN POR POLITIKAJ SKANDALOJ

**Anstataŭ serioze okupiĝi pri la dosieroj de la ŝtataj sekretaj servoj, oni malhelpis ilian publikan aliron kaj misuzis ilin por misfamigi politikajn kontraŭulojn**

De d-ro László Levente Balogh, Debrecen[1]

En Hungario, pli profunda scienca analizado de la funkciado de la sekretaj servoj en la komunisma pasinteco komenciĝis nur en la kelklastaj jaroj. Ĉefa malfacilaĵo de la esplorado estis, ke fine de 1989 granda parto de la sekretservaj dosieroj estis detruita. Ĉi tiu parto ampleksis dokumentojn ekde la 1960-aj jaroj.

Jam en la tempo de la politika turniĝo eksplodis la unua grava skandalo nomita "Dunagate", dum kiu la amplekso de la detruado de dokumentoj fariĝis publike konata kaj konscia. La nomo de la skandalo "Dunagate", (danuba "gate") rilatis al la usona skandalo "Watergate", kvankam ekzistis multaj diferencoj. La 5-an de januaro 1990, du opoziciaj grupoj, kiuj tiam estis eksterparlamentaj, "SZDSZ" (Unuiĝo de Liberaj Demokratoj) kaj "Fidesz" (Unuiĝo de Junaj Demokratoj), okazigis gazetaran konferencon en kinejo en Budapeŝto kaj raportis pri la fakto, ke la organoj de la ŝtata sekureco de la Ministerio de la internaj aferoj daŭre kolektas informojn pri opoziciaj movadoj kaj politikistoj. Oni pruvis, ke la informoj estis kolektitaj per kaŝa subaŭskultado, daŭra poŝta kontrolado kaj raportado fare de kaŝitaj sekretaj agentoj.

Sed laŭ la ŝanĝita hungara konstitucio de 1989 kolekti tiajn informojn estis malpermesite, do la opoziciaj grupoj postulis la eksoficigon kaj eksiĝon de la koncernaj respondeculoj. Ne nur la kontraŭleĝa observado estis temo de la skandalo, sed evidentiĝis, ke en la Ministerio de la internaj aferoj oni daŭre detruis dosierojn kaj dokumentojn. Tiucele la opoziciaj grupoj prezentis skribajn kaj filmajn atestojn. En decembro 1989 la sendependa redakta teamo "Nigra Skatolo" (hung. Fekete doboz) raportis pri sekretegaj dokumentoj kaj montris filmojn pri kontraŭleĝa detruado de dosieroj. La reprezentantoj de la antaŭa politika potenco estis videble surprizitaj kaj provis distanciĝi de la skandalo, rifuzante la respondecon, dum la gvidantoj de la sekretaj servoj asertis, ke ili agas laŭ la leĝo. Tamen, la faktoj dokumentitaj de la amaskomunikilaro ne povis esti longe neitaj, ĉar ili estis konfirmitaj la 19-an de januaro 1990 de antaŭe nekonata grava atestanto, la eksa oficiro de la sekretaj servoj József Végvári. Li detale raportis pri la amplekso de la observado kaj detruado de dosieroj. Kelkajn tagojn poste la ministro pri internaj aferoj demisiis.

## Kiel agentoj de la Ministerio de la ŝtata sekureco de GDR spionadis en Hungario

La esplorado de la dosieroj de la sekretaj servoj de Hungario pli malfaciliĝis ankaŭ pro tio, ĉar tutece konservita dokumentaro pri unuopaj temoj ne disponeblis. La koncernaj dosieroj estis deponitaj dise ĉe iamaj sekcioj de la postorganizaĵoj de la sekretaj servoj. Tiel, la laboro de la ŝtata sekureco en Hungario devis esti rekonstruita laŭ konsistaj eroj de la arkivaĵo. Ili sufiĉis por bone prilumi almenaŭ unuopajn sub-areojn, ekzemple la kunlaboron kun la Ministerio de la ŝtata sekureco (MfS) de GDR. Ágnes Jobst, dungitino de la Historiaj Arkivoj de la Naciaj Sekurecaj Servoj (hung. Nemzetbiztonsági Szolgálatok Történeti Levéltára),[2] verkis la unuan fundamentan studon pri tio. En sia vaste

[1] D-ro László Levente Balogh instruas en la Instituto pri Politikaj Sciencoj en la Universitato de Debrecen kaj estas scienca prizorganto de la "Aŭstrio-Biblioteko" en Debreceno, Hungario. Aŭtoro de pluraj fakaj artikoloj pri historia politiko kaj politika filozofio.

[2] Vd. piednoton 6.

dokumentita libro *La Agadoj de la ŝtata sekureco de GDR en Hungario: La rilato de la orientgermana kaj hungara ŝtataj sekurecoj 1955-1989* (Budapeŝto, 2015)[3] ŝi traktis ĉi tiun malpli konatan temon.

Laŭ ŝiaj esploroj, la kunlaboro inter la sekretaj servoj de Hungario kaj GDR komenciĝis en marto 1955 kadre de la sekretserva kunlaboro inter la socialismaj ŝtatoj. Ĝi intensiĝis post la konstruado de la Berlina Muro en 1961. Ĉar la muro malfaciligis la rektan kontakton inter civitanoj de ambaŭ germanaj ŝtatoj, landoj kiel Ĉeĥoslovakio, Bulgario kaj Hungario ludis gravan rolon, servante kiel vojaĝceloj, ĉar tie parencoj kaj amikoj povis renkontiĝi – rimarkeble kiel turistoj. En 1964 la Ministerio de la ŝtata sekureco de GDR, nomita de la popolo "Stasi", starigis "operacajn" aŭ "funkciajn grupojn", kiuj havis la taskon observi la orient-okcidentajn civilajn rilatojn kaj malhelpi eblan fuĝadon al Okcidento.

La atento kaj aktiveco de la ŝtata sekureco de GDR etendiĝis al tuta Hungario, precipe al du regionoj: Budapeŝto kaj Balatona lago. En la komenco "Stasi" agadis en Hungario nur en la someraj monatoj. De 1975 ĝi sendis konstantan personaron al Hungario. La tiel nomata "Balatona brigado" konsistis el profesiaj agentoj kaj civiluloj, kies sola tasko estis observi kaj malkaŝi la rilatojn inter GDR-aj kaj FRG-aj turistoj. En la 1980-aj jaroj 50-60 homoj laboris ĉe Balatono en la somera sezono, kio signifis 50-60 procentojn de la ĉi-rilataj agadoj de la sekreta servo. La agentoj plejparte maskis sin kiel feriantajn parojn por resti nerimarkeblaj kiel spionoj. Por ili tio estis "funkcia feriado".

La agado de "Stasi" atingis sian kulminon en Hungario en 1989 lige kun la krizo de amasaj rifuĝintoj. Ĝiaj agentoj estis kontrabanditaj inter la GDR-aj rifuĝintoj kun la tasko identigi homojn pretajn fuĝi kaj ekscii, kiu donis la instigon. En la rifuĝejoj, kie regis principa malfido inter la homoj, la streĉa situacio ankoraŭ pligraviĝis. Tiel longe kiel ekzistis politika konflikto inter Hungario kaj GDR pro la krizo de rifuĝintoj, la hungara ŝtata sekureco havis konstantan kontakton kun siaj GDR-kolegoj kaj provis trankviligi ilin.

Sed la agentoj de "Stasi" disponis ankaŭ pri precizaj informoj pri la hungara transforma procezo. Ili multe raportis pri reformemaj publikaĵoj en la hungaraj amaskomunikiloj kaj ĉeestis la plej gravajn protestajn manifestaciojn. Ili liveris skribajn raportojn pri siaj observoj kaj observaj agadoj, kiuj estis resumitaj de la GDR-a ambasado en Budapeŝto kaj senditaj al Orienta Berlino. La Ministerio de la ŝtata sekureco de GDR kolektis la raportojn en du speciale kreitaj dosieroj pri la hungaraj reformoj kun la titoloj "La agado de la kontraŭ-socialismaj fortoj en Hungario" kaj "La alternativaj politikaj fortoj kaj grupoj en Hungario". La funkcia grupo de "Stasi" en Hungario estis malfondita nur en februaro 1990, unu monaton post la sturmado de la ĉefsidejo de la MfS en Berlino-Liĥtenbergo.

## Malnova elito de Hungario ne interesiĝis pri la likvido de la sekretaj servoj

La malfacileco esplori tian sekretservan kunlaboron kaj la ĝeneralan agadon de la hungara sekreta polico sub la ŝtata socialisma reĝimo de Hungario estas ligita kun la specifaĵoj de la hungara transforma procezo de la jaroj 1989-1990. La politika renverso en Hungario okazis ĉefe per intertraktado ĉe la Ronda Tablo. Kompare kun GDR, en Hungario ne okazis akra abrupta turniĝo pro ribelo kun tutlandaj manifestacioj, kiuj dividis la tempon, kiel simbola evento, en antaŭan kaj postan eraon.

La hungara sistemŝanĝo estis longdaŭra procezo, kiu estis ligita al pluraj turnopunktoj, sed ne al iu akra limo – kaj al neniuj sensaciaj momentoj kiel la "sturmado de la ejo de la ŝtata sekureco" je la 15-a de januaro 1990 en Orienta Berlino. Ĉi tio ankaŭ rilatis al la fakto, ke la tiamaj potenculoj de Hungario mem ludis esencan rolon en la malmuntado de la ŝtata socialisma sistemo. La nomenklaturo mem partoprenis la ŝanĝan procezon kaj rezignis pri sia politika regado sen perforto. La transformo okazis tiel, ke la nekomunisma opozicio negocis kun la regantoj ĉion paŝon post paŝo. La rezulto estis enleĝigita de la komunisma parlamento, kiu estis elektita por la lasta fojo en 1985, kaj konfirmita kadre de konstitucia ŝanĝo. Ĉi tiu procedo ebligis pacan transiron en Hungario.

El ĉi tiuj cirkonstancoj rezultis, ke multaj niveloj de la ekonomio, socio kaj politiko kaj precipe la ŝtataj aŭtoritatoj spertis fortan institucian kaj personan kontinuecon. Malnovaj strukturoj

[3] Jobst Agnes: A Stasi működése magyarországon: A keletnémet és a magyar állambiztonság kapcsolata 1955-1989. Budapest, Jaffa Kaido 2015. 344 p.

daŭris ekzisti sub tre modifitaj juraj kondiĉoj. Dum la interparoloj ĉe la Ronda Tablo unu vorto apenaŭ estis dirita pri la jura kaj politika respondecoj de la ŝtata socialisma reĝimo – kaj sekve ankaŭ ne pri la estonteco de la sekretaj servoj. En GDR, aliflanke, la temo estis multe pli publike diskutata. En Hungario la temo aktualis nur inter la grupoj de la nekomunisma opozicio. Ĉar dekomence ĝi ne estis profundigita kaj klarigita, baldaŭ aperis potencialo de politika konflikto, kiu daŭras ĝis hodiaŭ. Ĉi tiu situacio klarigeblas unuflanke per la fakto, ke la nova politika elito havis naivajn kaj malĝustajn imagojn kaj nesufiĉan scion pri la netravidebla strukturo kaj amplekso de la sekretaj servoj. Aliflanke, la malnova elito ne estis interesita pri la likvido de tiuj servoj, ĉar ĝi esperis daŭre kontroli la procezojn de la sistema transformo.

## Unuaj leĝaj paŝoj al la "lustracio"

Dum en Germanio la prilaborado de la dosieroj de la sekreta servo de GDR rapide disvolviĝis kaj la detruado de dokumentoj povis esti ĉesigita, ĉi tiu procezo estis multe pli komplika en Hungario. Ĉi tie en la centron de la atento unue venis la debato pri revizio kaj forigo de dungitoj kun sekretserva pasinteco plenumantaj publikan oficon. Temas pri la t.n. *"lustracio"*.[4] La unuaj paŝoj al tia laŭleĝa retakso de la pasinteco de la komunisma ŝtata sekureco de Hungario sekvis en 1990, kiam du opoziciaj membroj de la partia alianco SZDSZ (Unuiĝo de Liberaj Demokratoj) prezentis proponon pri la purigado de eksaj agentoj de la interna defendo. Ilia leĝpropono tamen rilatis nur al unu sekcio de la sekreta servo, nome do la interna defendo, kiu estis ligita kun la demando pri la riparado (de la rajtoj de viktimoj) kaj scienca esplorado. La regantaj partioj malakceptis la proponon kaj prezentis propran projekton en la sekva jaro. Ekzistis tiom multaj proponoj de modifo, ke la registaro reprenis la projekton de revizio. Tio kaŭzis, ke la unua hungara leĝo pri kontrolado de personoj plenumantaj publikan oficon ekvalidis nur la 5-an de aprilo 1994, dum en Germanio la komparebla oficiala registara instanco komencis sian laboron jam en januaro 1992.[5] La 7-an de aprilo, en la plej lasta tago de la kuranta leĝdona periodo, la hungara parlamento elektis tri el ses antaŭviditaj juĝistoj por plenumi la lustracion. Tiumaniere la registaro de József Antall sukcesis certigi, ke la lustracia leĝo ne validas por la membroj de la unua libere elektita parlamento de la jaroj 1990-1994. Krom tio, la Konstitucia Kortumo suspendis multajn leĝordonojn kaj tuj devigis la parlamenton aprobi novan leĝon. Laŭ la decido de tiu kortumo, la parlamento devis precize difini la grupon de lustraciotaj personoj, garantii la rajton al informa memdecido kaj sekurigi la aliron al la esplorado. Kiel grava problemo evidentiĝis, ke la restintaj dosieroj ne estis konservitaj en unusola loko, sed, kiel dirite, ĉe malsamaj institucioj, kiuj povis memstare decidi, ĉu ili disponigu ĉi tiujn dosierojn al la esplorado.

## Protekto de la datumoj pli gravas ol la rajto konsulti personajn dosierojn

Leĝa amendo en 1996 provis konformiĝi al la reguloj de la Konstitucia Tribunalo, sed konsideri kaj plenumi tiom da aspektoj en ununura leĝo ne estis facila afero. Finfine okazis sukcesoj, kiuj almenaŭ iomete orientiĝis laŭ la germana modelo: Kadre de la "informa riparo" civitanoj nun rajtis konsulti dosierojn, kiuj temis pri ili mem, kvankam ili ne rajtis ekscii la nomojn de la agentoj, kiuj raportis pri ili. Grava paŝo antaŭen sur la vojo al instituciigo estis, ke surbaze de la leĝo estis establita t.n. Historia Oficejo (hung. Történeti Hivatal), kiu funkcias kiel arkivo ekde 2001. Tamen granda parto de la dokumentoj daŭre troviĝis ĉe ŝtataj instancoj, kiuj povis memstare decidi pri tio, ĉu iliaj dosieroj daŭre estu klasifikitaj kiel sekretaj. Tiel la dokumentoj de la iamaj sekretaj servoj iĝis facile manipuleblaj. La rajto de la dungitoj de la ŝtataj sekurecaj servoj al protektado de personaj datumoj kaj la daŭra sekura ekzisto de la postorganizaĵoj de la sekretaj servoj ŝajnis pli gravaj ol la rajto de la iam subpremataj kaj persekutataj civitanoj aliri la personajn dosierojn de la sekretaj servoj.

Nur en 2002 la tiama ĉefministro Péter Medgyessy prezentis du leĝprojektojn sub la numeroj "T/541" kaj "T/542", post kiam li mem perdis sian honoron, ĉar laŭdire li mem estis sekreta oficiro "D-209" de la kontraŭspionado. La unua projekto rilatis al la agado de la sekretaj servoj de la

[4] Lustracio, lustracii (tr.), vortoj neekzistantaj en PIV. Ilian signifon komparu kun nacilingvaj klarigoj ekz. sub https://en.wikipedia.org/wiki/Lustration, https://de.wikipedia.org/wiki/Lustration.
[5] Temas pri Bundesbeaufragter für die Stasi-Unterlagen, vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Bundesbeauftragter_für_die_Stasi-Unterlagen.

komunisma reĝimo kaj al la oficialigo de ĝia prilaborado. Kiel rezulto fondiĝis la Historia Arkivo de la Ŝtataj Sekurecaj Servoj (hung. Állambiztonsági Szolgálatok Történeti Levéltára ABTL).[6] La dua projekto antaŭvidis la publikigon de la nomoj de tiuj personoj, kiuj laboris en la pasinteco en la ŝtata sekureco kaj aktuale okupis publikan pozicion. Ĉi tiu leĝprojekto "T/541" servis al la "informa riparo", ebligante al koncernitaj personoj ne nur la rajton konsulti kaj kontroli la proprajn personajn dosierojn, sed ankaŭ ekscii la nomojn de iliaj verkintoj. La leĝo ankaŭ permesis al postaj parencoj de la viktimoj havi aliron al la dosieroj pri iliaj gepatroj kaj geavoj. Nur se la gepatroj kaj geavoj mem estis agentoj, la infanoj kaj nepoj ne ricevis informojn.

Pridisputataj restis kazoj, en kiuj iu persono estis samtempe kaj observanto kaj estis observata. Laŭ tio, en la procezo de la "informa riparo", nur 4-5 procentoj de la agentaj nomoj fariĝis publikaj. Nu, la leĝo permesis ankaŭ al esploristoj pli profundan enrigardon en la arkivaĵojn, por ke ili povu pli bone kompreni kaj klarigi la historion de la sekretaj servoj. Sed la esplorado ne ĉiam utilis al la scienca prilaborado, sed al la politika misfamigo.

La dua leĝpropono "T/542" rilatis al la lustracio de diversaj formoj de agadoj de ŝtataj sekurecaj servoj inter 1944 kaj 1990. Ĉar la parlamento aprobis nur la unuan leĝon, la solvo de kontentiga kaj ampleksa lustracio restis (dume) neplenumita.

Pliaj progresoj estis faritaj nur en somero 2007. La registaro de Ferenc Gyurcsány decidis pri preskribo kun la celo krei komisionon de historiistoj kaj arkivistoj, kiuj estis taskitaj eltrovi en kiom da lokoj kaj en kiu amplekso troviĝas dokumentoj kaj dosieroj de la komunisma ŝtata sekureco ekster la Historia Arkivo de la Ŝtataj Sekurecaj Servoj kaj kie ili estas troveblaj. Ĉi tiu inventarado okazis sukcese kaj estis prezentita en ampleksa raporto. La komisiono ellaboris pliajn proponojn pri kiel oni povus pli bone trakti kaj prilabori la diktaturan pasintecon surbaze de sekretservaj dokumentoj. Tamen, post la eksiĝo de la ĉefministro en aprilo 2009, ĉi tiuj proponoj ne plu estis traktataj.

Ĉi tiu entute hezitema aliro al ampleksaj retakso kaj prilaboro de la historio de la sekretaj servoj de Hungario ankaŭ kaŭzis negativajn kromefikojn en la publika percepto. Ekde la komenco ĝi malfermis la pordon al la skandaligo[7] de la pasinteco kaj faris el la heredaĵo de la ŝtatsocialisma reĝimo kaj precipe de la sekretaj servoj ludilon de la partia politiko, kiu estis ofte misuzata.

## Agentaj listoj por politika ĉantaĝo

La listoj de supozataj agentoj kun nomoj de kunlaborantoj de la interna sekureca servo konstante fariĝis la ludilo de la ĉiutaga partia politiko en Hungario kaj estis aparte taŭgaj por ĉantaĝi politikajn kontraŭulojn en la lukto por la potenco. La unuan tagon (3-a de majo 1990) de la libere elektita parlamento, la eksiĝanta ĉefministro Miklós Németh transdonis al la nova ĉefministro József Antall fermitan koverton, kiu supozeble enhavis liston de la nomoj de la nove elektitaj parlamentanoj, kiuj iel kunlaboris kun la komunisma ŝtata sekureco. La listo ne estis publikigita tiam aŭ poste, sed disvastiĝis diversaj legendoj, kiuj asertis, ke inter la parlamentanoj de la tiamaj regantaj partioj troviĝis multaj eksaj agentoj. En 1991, la tiama ĉefministro József Antall volis denove transdoni koverton al sia koalicia partnero József Torgyán. Sed Torgyán rifuzis la rezulton de sia lustracio kiel provokon. En 1993 la ĉefministro provis, ene de sia partio, marĝenigi sian ekstrem-dekstran politikan kontraŭulon István Csurka pere de akuzo, ke li estis agento, kaj poste forigi lin. En gazeta artikolo Csurka parte konfirmis sian pasintecon kiel agento kaj poste faris novan karieron kiel kontraŭ-komunisma kaj radikal-dekstra partiestro kun sia ĵus fondita partio MIÉP.

## La ĉefministro kiel agento de la sekureca servo

La elektoj de la jaro 2002 estis nete gajnitaj de la Maldekstra MSZP kaj Liberala SZDSZ. Péter Medgyessy fariĝis nova ĉefministro de Hungario. Kelkajn semajnojn post lia enoficiĝo, la 18-an de junio, sur la unua paĝo de la dekstra konservativa ĵurnalo *Magyar Nemzet* aperis artikolo, en kiu estis

[6] Ĝian aktualan retpaĝon vd. sub https://www.abtl.hu.

[7] Kvankam laŭ PV skandali estas tranzitiva verbo, uzatas ĉi tie la sufikso -ig- por la substantivo (anstataŭ skandalado).

asertite, ke la ĉefministro – kiel jam menciite en ĉi tiu teksto – funkciis kiel sekreta oficiro "D-209" de la kontraŭspionado. La ĉefministro unue neis sian tiaman pozicion, sed poste agnoskis, ke li laboris por la hungara sekreta servo inter 1977 kaj 1982 pro „patriota devo". Li argumentis, ke kontraŭspionado estas laŭleĝa aktiveco kaj, kompreneble, neniel rilatas al subpremado de la popolo.

Post la eksplodo de la skandalo, la opozicio postulis la demision de la ĉefministro, kaj estiĝis grava konflikto en la koalicio. Poste aperis ankaŭ aliaj dokumentoj rilataj al lia persono, sed ilia aŭtenteco ĉiam restis kontestata. La ĉefministro eltenis la skandalon kaj promesis novan leĝon, kiu devis ebligi ampleksan klarigon kaj detalan esploradon de la ŝarĝita pasinteco.

La plej lasta skandalo sekvis en 2014. Viktor Orbán, ekde 2010 (multe pridisputata) ĉefministro de la reganta dekstra konservativa partio "Fidesz", kiu fariĝis konata pro sia akra kontraŭ-komunisma retoriko, nomumis László Tasnádi nova ŝtatsekretario de la ministerio de la internaj aferoj de la Fidesz-registaro (post perdita konfido li devis demisii fine de 2016). En la komunisma periodo Tasnádi estis ĉefleŭtenanto kaj poste kapitano de la ŝtata sekureco. Post la politika turniĝo Tasnádi daŭre laboris por la sekreta servo sur la kampoj de la interna defendo kaj spionado. Kiam la 16-an de junio 1989 la iama hungara ĉefministro Imre Nagy, kiu estis mortigita en 1958, estis reentombigita, Tasnádi estis informita de du agentoj (pri la sekretservaj aspektoj de la evento). En la koncernaj raportoj aperis ankaŭ la nomo de Viktor Orbán. Ĉi tiu kazo plifortigas la ĝeneralan hungaran supozon, ke „mia agento estas patrioto, via agento estas perfidulo".

**Konkludo**

Tro longe Hungario ne emis okupiĝi pri la demando de ĝiaj sekretaj servoj, neglektis kaj prokrastis fari la sekretservajn dosierojn libere alireblaj laŭ ĉiaj manieroj. Kvankam la situacio fariĝis pli travidebla en la lastaj jaroj kaj la scienca prilaborado de la dosieroj progresis paŝon post paŝo, ĝi ne estis praktikata tiel sistemece kiel en Germanio. Unuavice la temo de la pritraktado de la historio de la sekretaj servoj de Hungario restis interesa ĉefe por servi al skandaloj.

© www.planlingvoj.ch, elgermanigis A. Künzli, okt. 2021 kun la afabla konsento de la hungara aŭtoro. La germanlingva originalo troveblas sub https://www.bpb.de/geschichte/deutsche-geschichte/stasi/223581/skandalisierung-in-ungarn.